

Enhavo

- **anoncoj**

Tradukinto serĉas usonajn provlegantojn; Korespondi deziras; Forpaso: Sara Ann ESTLING; Forpaso: Rochelle Florence GROSSMAN; Upcoming UEA-KER exam at Stanford University; Venonta elekto de estraranoj

- **Malkovri Montrealon... trovi amikojn!**

kongresaj raportoj - Ĵenja Amis

Antaŭ ol la Estraro de UEA elektas urbon por la UK, reprezentantoj de UEA vizitas kandidat-urbojn por inspekti eventualajn kongresejojn, hotelojn kaj vidindaĵojn, kaj por konatiĝi kun la lokaj organizaj teamoj. Ankaŭ Montrealo – kandidat-urbo por la UK en 2017 – ne estis escepto.

- **NASK revenos al Raleigh kun KTF**
anoncoj

En Junio la Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK) revenos al la Universitato William Peace in Raleigh, Norda Karolino, kie ĝi okazos samtempe kun la Kino-Teatro-Festivalo (KTF) por liveri esceptan eventon — eble, la plej priparolatan en la historio de la kursaro!

- **leterkesto**

Esperanto, la edzperanto... kaj pli

- **Varti jaguaron**

rakonte - Johano Bentley

Unu nuban, malluman nokton, mia amiko eniris la korton por zorgi pri la jaguaro. Kiel kutime, li alvenis kun sia biglo, Sally. Sally bojegis kaj kuregis laŭ la korto al la kaĝo. La pordo de la kaĝo estis malfermita!

- **Sonos**

senintenca esperantaĵo?

Jen sendrata laŭparolilo kiu promesas, ke io aŭdiĝos el ĝi. Iam.

- **Vinovolo**

senintenca esperantaĵo?

Se hazarde vi sentas vinovolon laŭvoje al la Landa Kongreso en Junio, jen la loko por vi.

ISSN: 1056-0297Usona

Esperantisto

Dumonata bulteno de Esperanto-USA • Numero 2015:1 (jan-feb)

American

Esperantist

Bi-monthly bulletin of Esperanto-USA • 2015:1 (jan-feb)



Ĉi-numere:

- Anoncoj: NASK revenos al Norda Karolino kun Kino-Teatro-Festivalo
- Rakonte: Varti jaguaron
- Kaj multe pli...

Ĉu finfine UK en Nord-Ameriko? UEA konsideras Montrealon

Tradukinto serĉas usonajn provlegantojn

Jens SPILLNER estas germano kiu loĝas en Britujo. Pasintan jaron li tradukis libreton de la usona aktivisto *Peace Pilgrim*

[[http://eo.wikipedia.org](http://eo.wikipedia.org/wiki/Paco_Pilgrimulo)

/wiki/Paco_Pilgrimulo]. Lia dialekto de la angla lingvo estas pli simila al la brita ol la usona, do li serĉas spertajn usonajn esperantistojn, eble emerĝintajn, por provlegi la tradukaĵon kaj proponi korektojn. Ĉar li faris la traduklaboron senpage, li esperas, ke ankaŭ la korektado estos tiel farata. Se vi volas helpi, lia adreso estas <js.saluton@gmail.com>.



Korespondi deziras

Mi estas lernejestrino loĝanta en Kamembe, Ruando. Mi volas korespondi kun esperantistoj en Usono. Mi ĉirkaŭbrakas.

ZAWADI RUHUNGO Migonne,
<icxlmrusizi@gmail.com>

Se vi interesiĝas pri korespondo kun japanoj, bonvolu turni vin al Koresponda Servo de Japana Esperanto-Instituto. Skribante al ni korespondo-peton, por faciligi nian laboron bonvolu aldoni vian aĝon, sekson, profesion, interesojn kaj viajn preferojn.

Sinzyuku-ku, Waseda-mati 12-3, Tokio,
162-0042 Japanujo



Forpaso: Sara Ann ESTLING

Sara Ann ESTLING, naskita en 1922, forpasis en Walla Walla, Vaŝingtonio la 21-an de Novembro, 2014. Ŝia Esperanto-aktivado daŭris pli ol 40 jarojn en la regiono de Walla Walla. Kun ŝia edzo Al, Sara Ann kreis centron por disvastigi Esperanton, instrui la lingvon, kuraĝigi lernantojn, kaj gastigi



esperantistojn el multaj landoj. Sara Ann ankaŭ multe aktivis en la nord-okcidenta regiona renkontiĝo de esperantistoj (NOREK) kie ŝi ofte kontribuis al la distraj eventoj. Ŝi rigardis la mondon en ege pozitiva maniero, kaj pro bela animo ŝi amis preskaŭ ĉiujn.

Ĉiam pensante pri la estonteco kaj celo de Esperanto, ŝi donacis siajn Esperanto-librojn al la NASK-programo, tiel subtenante novan generacion de esperantistoj.

[*Multan dankon al Ellen EDDY pro la informo. Ellen verkis ankaŭ lokan novaĵon pri Sara Ann en n-ro 2011:3*].

Forpaso: Rochelle Florence GROSSMAN

La 30-an de Novembro 2014 forpasis Rochelle GROSSMAN, multjara delegito de UEA en Novjorko, iama prezidanto de la Novjorka Esperanto-Societo, kaj motoro de la Esperanto-movado en Novjorko. Ŝi naskiĝis la 24-an de Januaro 1925 en Newark, Novĵerzeo, kaj diplomiĝis ĉe la Ŝtata Kolegio de Montclair en la fako de la franca kaj hispana lingvoj. De Novĵerzeo ŝi translokiĝis al Novjorkurbo en 1955. Ŝi membriĝis en UEA en 1967, tuj kiel dumviva membro. Dum la plejparto de sia kariero, ŝi laboris kiel stabano de la sekretariato de Unuiĝintaj Nacioj, kie ŝi estis sinsekve sekretario, redaktisto, verkisto kaj esploristo en la Statistika Oficejo de la Ekonomia kaj Socia Konsilio (Ekosok).

Ĉe UN ŝi renkontis aliajn stabanojn Claude PIRON kaj Eskil SVANE, kiuj inter si instruis al ŝi Esperanton. Ili kune organizis Esperanto-klubon en la sino de la Asocio de UN-Stabanoj, inter kies membroj, en diversaj epokoj, estis Ambasadoro Ralph HARRY el Aŭstralio, Sunardo el Indonezio, kaj Mark STARR, kiu dum multaj jaroj rolis kiel oficiala reprezentanto de UEA ĉe Unuiĝintaj Nacioj. Post la forpaso de Mark Starr, Humphrey TONKIN transprenis tiun rolon kaj la paro Julius kaj Elizabeth MANSON kunordigis la surlokan agadon. Post sia emeritiĝo, Rochelle fariĝis gvidanto de la oficejo de UEA ĉe Unuiĝintaj Nacioj – funkcio, kiun ŝi plenumis tra multaj jaroj ĝis malsaniĝo devigis ŝin

retiriĝi.

“Ŝi estis grandioza homo – tiel bone informita, tiel engaĝita, tiel amikema,” diris Thomas ECCARDT, eksa prezidanto de la Novjorka Esperanto-Societo. “Ŝi donis al mi kaj aliaj esperantistoj tiom da feliĉaj memoroj; ni neniam tion diris, sed ĉiu konsideris ŝin la panjo de la Esperanto-Societo.... Ŝi estis aktiva ankaŭ en multaj aliaj senprofitcelaj agadoj.”

Deklaris Neil BLONSTEIN, la nuna direktoro de la oficejo en Novjorko, kaj prezidanto de la Societo, “Ni scias, ke ŝi amis klasikan muzikon kaj koncertojn – kaj tenison.” Ŝi estis ankaŭ talenta dancisto, kaj bona parolanto de Esperanto. Neil aparte memoras pri ŝia efika gvidado de la loka societo, en kiu ŝi neglektis nenium, eĉ plej malgrandan, detalon.

“Kvankam neniel retiriĝema aŭ timema,” diris Humphrey Tonkin, “Rochelle estis modesta persono, kiu diligente laboris malantaŭ la kulisoj, faciligis al aliaj la vojon, kaj lojale kaj energie kunlaboris en niaj diversaj iniciatoj ĉe UN. Ŝi estis ofta ĉeestanto de Universalaj Kongresoj kaj ankaŭ aktivis en landa Esperanto-agado, ankaŭ kiel estrarano de ELNA, la landa Esperanto-asocio. Dum multaj jaroj ŝi kvazaŭ reprezentis la kontinuecon de la agado de UEA ĉe Unuiĝintaj Nacioj. Ŝi estis modela reprezentanto de Esperanto.”

[Multan dankon al Humphrey TONKIN pro la informo.]

Upcoming UEA-KER exam at Stanford University

Are you interested in joining the ranks of the 1500 Esperanto-speakers worldwide who have taken the international Esperanto UEA-KER exam? In December 2008, Esperanto became one of the languages participating in the Council of Europe's officially accepted international exams. These exams provide a certified language diploma, accepted officially throughout Europe, in one of three levels: basic, intermediate & advanced. So far, about 1500

Esperanto-speakers have successfully passed the exam in 61 countries.

Last June at Stanford University, we arranged an exam session as part of the UEA-KER International Exam Day, in which Esperanto speakers all over the world took the exam on the same day. This year's date is May 30th. If you're interested, please contact Amanda Higley Schmidt for more information: (916) 962-1548 or <Amanda_higley@yahoo.com>.

—Amanda Higley SCHMIDT



Venonta elekto de estraranoj

Dum la venonta landkongreso la membraro de Esperanto-USA devos elekti por trijara oficperiodo kasiston kaj tri aliajn estraranojn. La nuntempa kasisto estas George BAKER, kaj la aliaj estraranoj estas Jessica GRASSO, Anjo HARLOW, kaj Lucille HARMON. La oficperiodoj de ĉiuj finiĝos en 2015.



Ĉiuj estas pretaj kandidatiĝi denove. Tamen eblas proponi aliajn kandidatojn. Se vi volas fari tion, bonvolu sendi proponojn al Ronald GLOSSOP ĉe <rglossop@mindspring.com> 8894 Berkay Avenue, Jennings, MO 63136-5004.

La naŭ estraranoj kies oficperiodoj ne finiĝos en 2015 estas Elizabeto DORCAS, Taylor FRANCIS, Kelly NETTERVILLE, Earl BILLS, Charlotte BURTON, Andreo ROSENBAUM, prezidanto Orlando RAOLA, vicprezidanto Julie SPICKLER, kaj sekretario Chris NELSON.

Ni tre dankas al ĉiuj funkciuloj pro siaj gravaj laboroj por Esperanto-USA.

—Ronald GLOSSOP, *Estro, Kandidatiga Komitato por 2015*

leterkesto

Esperanto, la edzperanto... kaj pli

Mi naskiĝis en Anglujo. Mi havas naŭdek tri jarojn, kaj kvankam mi eklernis Esperanton kiam mi havis dek kvin jarojn, mi ankoraŭ ne estas sperta parolanto. Sed aŭskultu! Esperanto formis mian vivon.



geedziĝis, kaj mi venis loĝi en Baltimore, kie estis Esperanta grupeto. Tie mi renkontis amikinojn, kaj la amikeco daŭris kvindek jarojn!

Do, mi certe diras: “Esperanto donis al mi edzon, du geinfanojn, plej bonan amikinojn, kaj vivdaŭron plenan je intereso.”

— *Marion KAMINKOW, Asheville NC*

Mi havis kelkajn korespondantojn en Eŭropo kaj Usono. Kiam la milito okazis, mia samideano en Usono skribis: “Mia amiko estas armeano, kaj li vojaĝos al Anglujo. Ĉu vi permesas, ke li telefonu al vi?”

“Certe”, mi konsentis.

Do li telefonis, ni renkontiĝis, li batalis en Francujo, kaj li revenis al Usono. Ni skribis leteron post letero dum kelkaj jaroj kaj mi vizitis Usonon. Finfine ni

Skribu al *Usona Esperantisto!*

Bonvenaj estas viaj komentoj (en la angla aŭ en Esperanto) ĉu pri Esperantujo, ĉu pri la lingvoproblemo, aŭ ĉu pri io lastatempe aperinta en *UE*. Leteroj estu prefere ne pli ol 300 vortojn longaj; anoncoj, ne pli ol 400. Sendu mesaĝojn al la redakcio.



senintenca esperantaĵo?

Vinovolo



Tiun vintrinkejon trovis via redaktoro en la metropola flughaveno de Detrojto. Se hazarde vi sentas vinovolon flugante al la Landa Kongreso en Junio, jen la loko por vi.

NASK revenos al Raleigh kun KTF

En Junio la Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK) revenos al la Universitato William Peace in Raleigh, Norda Karolino, kie ĝi okazos samtempe kun la Kino-Teatro-Festivalo (KTF) por liveri esceptan eventon — eble, la plej preparolatan en la historio de la kursaro!



La bela kampuso de la universitato William Peace estas ideala loko por NASK: historie riĉa, oportune moderna, ne tro granda, kaj proksima al vigla urbocentro kun diversaj vidindaĵoj.

NASK estas unika instruprogramo kiu altiras lernantojn kaj instruistojn el la tuta mondo. Dum sia 45-jara historio, NASK okazis unue ĉe San-Franciska Ŝtata Universitato ĝis 2002, poste ĉe la *School for International Training* en Brattleboro (Vermonto) en 2002-2006, kaj ĉe la Universitato de Kalifornio en San-Diego en 2007-2011. Ekde 2012 ĝi vojaĝis kun usonaj landaj kongresoj al Teksaso, Norda Karolino, kaj Brita Kolumbio. Ĉi-jare ĝi revenos al la verda kampuso de Universitato William Peace en Raleigh.

La unuaj kvar tagoj koincidos kun la dua

Kino-Teatro-Festivalo, kiu grande sukcesis pasintjare en Vaŝingtonio. Aldone al la kutimaj kursoj kaj posttagmezaj NASK-programoj, okazos ankaŭ metiejoj pri filmado, teatra verkado, video-redaktado, kaj pli. Oni havos multajn okazojn renkonti novajn amikojn kaj dividi sciojn kun aliuloj.

NASK okazos de la 30-a de Junio ĝis la 9-a de Julio, kaj KTF de la 30-a ĝis la 5-a: entute ok tagoj, ne nur da lernado, amuziĝo kaj artoj, sed ankaŭ esplorado de muzeoj, restoracioj kaj butikoj en la ĉirkaŭa urbo. Paul GUBBINS, membro de la Akademio de Esperanto kaj aŭtoro de multaj verkoj — inkluzive de la videa kurso *Pasporto al la Tuta Mondo* — instruos la superan kurson. Lee MILLER, profesia interpretisto de la Usona Signo-Lingvo, instruos la meznivelan kurson, kaj Ĵenja BONDELID (“Helena” en *Pasporto*), koregrafo, kaj balet-instruistino, gvidos la komencintan kurson. Oni povas enskribiĝi por la tuta programo aŭ nur por la unuaj kvar tagoj. La bazaj prezoj varias ekde \$175 (sen loĝado, 4-taga programo) ĝis \$735 (kun loĝado kaj manĝoj, 8 tagoj). Aliĝu antaŭ la 15-a de Aprilo por ricevi la plej bonan prezon!

Venu al NASK kaj KTF en 2015!



Por pli da detaloj, kaj informo pri aliĝo, vidu la TTT-paĝarojn de la Nord-Amerika Somera Kursaro [<http://nask.esperantic.org>] kaj Kino-Teatro-Festivalo [<http://kotofesto.org>].

Se vi havas demandojn, bv. kontakti la NASK-administranton, Ellen M. EDDY, <EDDYELLEN@aol.com>.

Malkovri Montrealon... trovi amikojn!

Jenja AMIS

Antaŭ ol la Estraro de UEA elektas urbon por la UK, reprezentantoj de UEA vizitas kandidat-urbojn por inspekti eventualajn kongresejojn, hotelojn kaj vidindaĵojn, kaj por konatiĝi kun la lokaj organizaj teamoj. Ankaŭ Montrealo – kandidat-urbo por la UK en 2017 – ne estis escepto: inter la 10-a kaj la 14-a de Decembro 2014 la urbon vizitis la Konstanta Kongresa Sekretario de UEA, Clay MAGALHÃES, kaj la Ĝenerala Sekretario kaj estrarano de UEA, Martin SCHÄFFER. Ankaŭ Orlando RAOLA, la prezidanto de Esperanto-USA, venis por montri la plenan subtenon de usonaj esperantistoj por tiu komuna projekto de Esperanto-Societo Kebekia, Kanada Esperanto-Asocio kaj Esperanto-USA.

Respondeculo pri Universalaj Kongresoj jam pli ol jardekon, naskiĝinta en Brazilo, Clay neniam estis en Nord-Ameriko ĝis tiu ĉi vizito al Montrealo pro unu simpla kialo: lastfoje UK okazis en nia kontinento antaŭ pli ol 30 jaroj! Ĝuste pro tio li ŝajne estis tre ĝoja pro la invito de Montrealo gastigi la UK-on: finfine, jen okazo iri al Nord-Ameriko!



Martin, Jenja, Joel, Clay... kaj neĝo!

Ni esperis, ke Montrealo estos sennega dum la vizito de niaj gastoj, sed la Patrino-Naturo decidis alimaniere, kaj ĝuste la tagon de la alveno de Clay

kaj Martin (ambaŭ el pli varmaj lokoj) la urbon kovris densa tavolo de la unua granda neĝo de la jaro. “Tio estas Nord-Ameriko, ne la Norda Poluso, eĉ se nun ĝi aspektas pli kiel la Norda Poluso”, ni ŝercis elirante el la flughaveno. Ni rapide konstatis, ke anstataŭ la simbolaj ĉapeto, koltuko kaj gantoj (“por supervivi en Kanado vintre”) ni eble devintus alporti akvoimunajn botojn; tio estis la sola afero, kiu vere mankis al niaj gastoj. Sed malgraŭ la ne ĉiam-aparte-agrabla promenado kun la malseka neĝo ankoraŭ surstrate, Martin estis impresita de tio, kiom aktiva estas la urbo eĉ post la neĝoŝtormo kaj antaŭ ol oni forigis la neĝon, kaj Clay, ravita de la blanka magio de la urbo, plezure fotis neĝokovritajn arbojn, stratojn kaj la famajn montrealajn kurbajn ŝtuparojn.

Nia unua tago estis plene aranĝita de Montreala Turismo – la turisma oficejo de la urbo: nia fidela partnero kaj magia helpanto en tiu grandioza projekto inviti la plej grandan Esperanto-eventon al nia urbo. En la kompanio de profesia ekskursgvidantino kaj verkistino pri fajnaj manĝaĵoj, ni malkovrigis al la gastoj nian urbon.

La ĉefurbo de kisoj

Landoj – kaj urboj – ofte havas siajn logotipojn: bildojn, kiuj plej bone reprezentas ilin. Montrealo havas eĉ du: la oficialan, kaj ankaŭ tiun de Montreala Turismo, kiu elektis kiel simbolon... kison!

Kial kison? Unue, ĉar en Montrealo (kaj Kebekio ĝenerale) virinoj kisas siajn amikojn kaj amikinojn, simile al oni faras en pluraj landoj de Eŭropo (kutime dufoje, sur dekstra kaj poste sur maldekstra vango), dum en aliaj kanadaj provincoj kaj en la apuda Usono, kie oni ne kisas, sed brakumas amikojn. Estas ankaŭ plia kialo: sur mapo, la insulo de Montrealo (ja Montrealo troviĝas sur granda insulo sur la rivero Sankta-Laŭrenco), kune kun la apuda insulo, similas al du lipoj de buŝo, kiuj formiĝis por kiso.



La du logotipoj de Montrealo (la oficiala, kaj la kiso) surmetitaj sur la kis-forman mapon de Montrealo kaj apuda insulo.

Ĉu aŭto? Ne! BBMP!

Traveturante diversajn partojn de la urbo, gvidantino atentigas nin, ke senescepte ĉiuj kvartaloj de Montrealo estas miksaĵoj de privataj loĝejoj kaj komercaj ejoj: alivorte, la urbo tute ne havas pure “dormajn” kvartalojn. Malsimile al pluraj aliaj grandaj urboj, Montrealo ankaŭ ne havas danĝerajn kvartalojn kaj ĝi estas unu el la plej sekuraj urboj en Nord-Ameriko.

La plejparto de la montrealanoj loĝas en malpli ol 30-minuta veturdistanco de siaj laborejoj, fiere notas nia gvidantino, kaj la plej ofte maniero iri de punkto A al punkto B en la urbo estas “BBMP”: bicikle, buse, metroe kaj piede! Multaj urboj en Nord-Ameriko estis planitaj por aŭtomobilistoj, sed Montrealo estas iom escepta: ĝi estis planita por piedirantoj, biciklistoj kaj uzantoj de publika transporto: dum aliaj urboj de Nord-Ameriko pli kaj pli ekspansiis al antaŭurboj, por pli malmultekostaj terenoj kaj pli grandaj domoj, Montrealo faris la malon: oni konstruis bonan transportsistemon, kun metroo plene subtere, por ke ĝi funkcii seninterrompe en iu ajn vetero; oni faris biciklajn vojojn (kies kvanto pligrandiĝas preskaŭ ĉiujare) kaj eĉ konstruis la tutan subteran urbon. En Montrealo oni ankaŭ severe limigas la altigon de prezoj por loĝejoj, tiel ke ĝi estas unu el la plej malmultekostaj

urboj en Nord-Ameriko. Ĉio ĉi donis bonajn rezultojn: montrealanoj adoras sian buntan kaj amuzeman urbon kaj la plejparto de miaj amikoj ne povas imagi ŝanĝi la komforton de la urba vivo por pli granda domo en antaŭurbo.

En Montrealo oni piediras kaj biciklas en iu ajn vetero (jes, iuj frenezuloj biciklas ankaŭ vintre!), sed somere oni promenas eĉ pli, ĉar pluraj stratoj fariĝas plene piedireblaj (tute fermitaj al aŭtoj). “Plie, vi eĉ povas peti ke la urbo fermu vian straton por kelkaj horoj. Ekzemple, supozu ke vi volas festi vian naskiĝtagon kun najbaroj kaj amikoj sur strato apud via domo. Simple avertu la urbon, kaj vi eĉ ricevos du polic-aŭtojn – komence kaj fine de la strato, kaj la policistoj ĝentile avertos la ŝoforojn ke la strato estas fermita por kultura evento”, diras nia gvidantino. Mia edzo kaj mi interŝanĝas signifoplenajn rigardojn: ĉu ni petu fermi straton speciale por ni, por novkreota montreala Esperanto-festivalo?!

32 kilometroj subtere

La fama strato *Ste-Catherine* estas, laŭ nia gvidantino, la plej granda butikuma strato en Kanado, sed la 15 km da vendejoj, kiujn oni vidas de sur la strato, estas nur la supra parto de la glacimonto, ĉar la pli granda parto de la butikoj troviĝas ne surtere, sed subtere! “Kiam, laŭ vi, oni plej ofte iras butikumi subtere?”, demandas la ekskursgvidantino.

“Kiam neĝas!” tuj respondas niaj gastoj.

“Fakte, ne – kiam pluvas”, ŝi korektas kun rideto. “Montrealanoj toleras neĝon (eĉ se ili foje plendas pri ĝi...), sed ili tute abomenas pluvon.” La montreala subtera urbo (oficiale, “RÉSO”, homofono de la franca vorto *reseau* – “reto”) estas plia unikaĵo de la urba planado de Montrealo kaj la plej granda subtera urbo en la mondo. 32 kilometrojn longa (duoblo de la larĝeco de la insulo!), klimatizita kaj kun natura lumo, ĝi interligas la tutan urbocentron en gigantan reton de tuneloj, vendejoj, restoracioj, bankoj, stacidomoj, universitatoj, kongresejoj, biblioteko kaj, kompreneble, la metroo: jen perfekta loko por perdiĝi... kaj trovi sin en iu butikoj, aĉetante novajn ŝuojn. (Kio ŝajne tro ofte okazas al mi!) La butikoj funkcias tra la semajno, ofte eĉ ĝis la 8-a

vespere kaj ankaŭ semajnfine, al la surpriziĝo de Clay: ja en okcidenta Eŭropo ili ofte fermiĝas frue kaj ofte ne funkcias dimanĉe – sed ne en Nord-Ameriko!

Vivi malpli rapide

Kiam la usona kafej-ĉeno *Starbucks* venis al Montrealo, ĝi devis ŝanĝi sian originalan planon por la kafejoj, aldonante pli grandajn spacojn por sidi, rakontas al ni la ĉiĉeronino: jes ja, en Montrealo oni estas malpli hastemaj ol en aliaj partoj de Nord-Ameriko kaj oni preferas trinki kafon sidante en kafejo anstataŭ rapidante sur la strato, kaj certe ne ŝoforante. Kial la vivoritmo en Montrealo estas pli malrapida? Interalie, danke al multaj enmigrintoj el mediteraneaj landoj, kiuj preferas malpli streĉan vivoritmon. En multaj laborejoj oni ankaŭ finas labori iom pli frue en vendredo (“kaj se via ĉefo ne lasas vin foriri frue kaj vi ne havas tro da fareda laboro, vi simple ‘malsaniĝas je gripo’ kaj ĉiuokaze foriras frue”). Tie, kie vintre kuŝas neĝo, en somero estos multaj terasoj, kie oni sidos ĝis malfrunokte kafumante, manĝante kaj ĝuante bieron aŭ vinon kun amikoj. “Laŭ la kvanto de mikrobierejoj, Montrealo cedas sian lokon nur al Belĝujo kaj Germanujo”, diras nia ĉiĉeronino, kiu ankaŭ gvidas manĝaĵ-ekskursojn, aldonante, ke ne estas eĉ unu manĝaĵ-revuo, kiu ne dediĉis la tutan numeron al Montrealo, aparte fama pro sia kuirarto. Tamen, oni bone manĝas ne nur en multekostegaj restoracioj: eĉ apudstrata sandviĉejo, se ĝi ne faras sandviĉojn bone, fermiĝos pro granda konkurenco. Multaj montrealaj restoracioj ankaŭ permesas onin alporti sian propran vinon aŭ bieron (serĉu ŝildon *apportez votre vin*) – kio multe malgrandigas vian fakturon, kaj la kutimo alporti proprajn trinkaĵojn ne estas vidata malbone.

Urbo kreema

Kreemo estas aparta trajto de la montreala karaktero: la urbo de festivaloj (somere en Montrealo okazas ĉirkaŭ naŭdeko!), muziko, modo, videoludoj, kino-arto kaj arkitekturo, Montrealo estas rafinita kombinaĵo de novaj kaj malnovaj elementoj, kiuj kunvivas en harmonio, sen ke unu parto dominu la alian. Bona ekzemplo de tiu kunvivaĵo estas “Katedralaj Promenadoj”: tiel nomiĝas la parto de la montreala subtera urbo, kiu troviĝas tuj sub bela gotika anglikana katedralo,

konstruita en la 19-a jarcento kaj daŭre funkcianta. Kial ĝi estas tiom speciala? Ĉar oni levis la tutan preĝejon super la tero, konstruis parton de la subtera urbo rekte sub ĝi, kaj poste oni remetis la preĝejon sur ties antaŭan lokon! Atentemuloj ankaŭ notos, ke la apuda altega ultramoderna konstruaĵo, en kiu respeguliĝas la preĝejo, havas gotik-formajn fenestrojn, kaj ĝia supro similas al mitro (alta dupinta kapvesto) de episkopo – omaĝe al sia najbara katedralo.

(Dum la sekvaj vizitoj al eventualaj kongresejoj kaj hoteloj, Clay demandis, ŝercante, ĉu la homoj, fakte, volos resti en la kongresejo estante en Montrealo?!)

La Reĝa Monto

La lastan tagon ni invitis niajn gastojn al la Reĝa Monto: *Mont Royal*, kiu donis sian nomon al la urbo. Laŭ unu rakonto, kiam Jacques CARTIER alvenis al la supro de la monto kaj de ĝi rigardis al la riverego, li diris, ke la vido de la monto estas vere reĝa. Mi ne scias, ĉu li vere diris tion aŭ ne, sed mi atestas, ke la vido de la monto ja estas reĝa: la blanka neĝa trankvilo de la vintro estas same bela kiel la verda abundo de la somero. 233 metrojn alta, la Reĝa Monto estas grandega parko tute meze de la urbo, ŝatata de montrealanoj en ĉiu sezono: somere por promeni, pikniki kaj bicikli, kaj vintre por skii, sketi, marŝi per rakedoj, aŭ ankaŭ simple promeni – kaj foti sciurojn en ĉiu sezono. (Ankaŭ Clay ne povis rezisti tiun tenton!) Ĉar Montrealo estas insulo, sciuroj abundas en nia urbo (ili ja ne povas naĝi por eliri de la insulo!), kaj ili aparte multas sur la Reĝa Monto, je granda amuziĝo de turistoj kaj novaj enmigrintoj.



Clay ne povis rezisti la tenton ludi kun sciuroj.

38 paroj de brilantaj okuloj

Universala Kongreso estas tre ĝuiga evento, sed ĝi estas ankaŭ tre peza laboro por la loka grupo, kiu invitis la kongreson. Ĝuste pro tio, UEA estas aparte atenta al la prepariteco de la loka teamo. La montrealaj esperantistoj tre bone impresis la gastojn – kaj per sia nombro, kaj per sia aktiveco, kaj per la alta nivelo de Esperanto.

La kulmino de nia intensa programo estis la Zamenhof-festo en la Montreala Esperanto-Domo [<http://youtu.be/j27dQBc5xM4>]: ŝajne, la ne tro granda domo de Normando (prezidanto de Esperanto-Societo Kebekia) kaj Zdravka (lia edzino) speciale por tiu evento mirakle grandiĝis por bonvenigi 38 entuziasmegajn esperantistojn (kelkaj eĉ veturis el apudaj ŝtatoj de Usono por veni al la festo!) – ĉiuj kun brilantaj okuloj kaj preto kunlabori por sukcesigi la eventon.

La vespero komenciĝis per diskuto pri organizado de UK. Martin klarigis la procedon de la elekto de kongres-urbo: la decidon faras la estraro. (Ĉi-foje ili estas kvin personoj, ĉar la du estraranoj el la konkurantaj landoj, Kanado kaj Koreujo, sindetenos de la voĉdono.) Oni konsideras multajn “tuŝeblajn” faktorojn (ekzemple, koston de la kongresejo, hoteloj, aviadil-biletoj), sed ankaŭ “netuŝeblajn” faktorojn: ekzemple, kiam la kongreso lastfoje okazis en la regiono, kian efikon la kongreso povus havi sur la Esperanto-movado en tiu loko, ktp. Multis ankaŭ demandoj al Clay pri kongres-

organizado, ekzemple, pri la laboro en la preparado kaj dum la kongreso, aŭ la kvanto da bezonataj helpantoj. Laŭ Clay, la absoluta minimumo da homoj necesaj en la organiza teamo estas deko, sed ju pli multas la helpantoj, des malpli ĉiuj el ili devas labori: ja ankaŭ volontuloj volas partopreni kaj ĝui la kongreson – kaj la plejparto de la laboro estas bezonata ĝuste dum la kongreso. Ni ankaŭ eksciis, ke, se kongreso estas sufiĉe profita, al volontuloj post la kongreso oni repagas la kongres-kotizon: jen eĉ plia instigo por helpi dumkongrese!

Post vigla babilado kaj abunda manĝo, okazis videaponto (la unuan fojon en la historio de la kanada E-movado!) inter ses kanadaj urboj el tri provincoj: Kebekio (Montrealo), Ontario (Toronto, Otavo kaj Londono), kaj Nov-Skotujo (Berviko kaj Halifakso). Joel AMIS legis du subtenleterojn de gravuloj: de la montreala urbestro, Denis CODERRE, kaj de federacia parlamentano Alexandre BOULERICE, el la Nov-Demokratia Partio, reprezentanta la distrikton, kie troviĝas la Montreala Esperanto-Domo. Esperantistoj el aliaj provincoj estis tre feliĉaj, ke Montrealo invitas la plej grandan Esperantan eventon al Kanado, kaj ĉiu grupo esprimis sian subtenon al la montreala kandidatiĝo. La torontanoj estis plej multnombraj post montrealanoj: 22, kaj ili eĉ preparis kaj legis rezolucion por montri la subtenon al UK en Montrealo en 2017. Jes ja, la volontuloj neniel mankos, aparte ĉar al kanadanoj aliĝos ankaŭ usonaj esperantistoj! Mi estis ĝoja vidi samideanojn de aliaj provincoj, kiujn mi ne renkontas ofte pro la vasteco de nia lando, kaj ni decidis fari videopontojn pli ofte: la organizado de la UK estos ankaŭ bona maniero ne nur konatiĝi kun esperantistoj el aliaj landoj, sed ankaŭ por pliproksimigi la esperantistojn en Nord-Ameriko!



En la montreala Esperanto-Domo.

Por ĝisrevidi niajn gastojn ni donacis al ili bongustaĵojn el Kanado, kun la nepra acersiro, kaj du librojn: la ĵus reeldonitajn *Kristnaskajn rakontojn el franca Kanado* kaj la jubilean libron de Esperanto-Societo Kebekio: *30 jaroj da agado*: “Ĉar ni ja faris ion dum 30 jaroj...” modeste komentis nia nelacigebla prezidanto, Normand FLEURY. La ĝisrevido estis kortuŝa. “Mia vizito al Montrealo estis neforgesebla, pro la varmeco kaj gastamo de montrealanoj”, diris Clay. Li feliĉis eĉ pri la neĝo, kiu faris la montrealan sperton aparte bela, festeca kaj... aŭtentika!

Ne adiaŭ... sed ĝis la revido, amikoj, en 2017!

Kiel vi povas helpi pri UK-2017 en Montrealo?

- Ŝatu nian paĝon en *Facebook* [<http://facebook.com/Montrealo2017>]!
- Helpu al ni traduki kaj plibonigi vikipediajn artikolojn pri Montrealo.
- Aliĝu al nia dissendolisto de helpantoj: aliĝu mem al [<montrealo-uk-2017@googlegroups.com>](mailto:montrealo-uk-2017@googlegroups.com) aŭ petu al Orlando RAOLA, [<oraola@gmail.com>](mailto:oraola@gmail.com).
- Faru rezolucion de via loka grupo por subteni la kongreson: skribu al Filipino DORCAS, [<filipo@grupoj.org>](mailto:filipo@grupoj.org).
- Proponu mem, kion vi ŝatus fari: Skribu al Joel AMIS [<joelamis@yahoo.com>](mailto:joelamis@yahoo.com).



Jenja AMIS

Naskita en Kievo, Jenja pasigis kvin jarojn en Atlanto kaj nun loĝas en Montrealo. Ŝi dum jaroj redaktis la revuon *Kontakto*, kaj nun ŝi laboras por la fonduso *Esperantic Studies Foundation*.

[<yevgeniya.amis@gmail.com>](mailto:yevgeniya.amis@gmail.com)

Varti jaguaron

Johano BENTLEY

Kiam mi estis freŝa, juna bestkuracisto, mi loĝis en Aŭstino, Teksaso. Ankaŭ unu el miaj amikoj tie estis bestkuracisto, kaj de tempo al tempo li laboris en loka bestoĝardeno. Tie li renkontis viron – nafto-miliardulon! – kiu posedis jaguaron ĉe sia domo. (Ne demandu, kial la viro posedis jaguaron. Li estis riĉa folulo, laŭ mi.)

Mia amiko proponis sin por varti la jaguaron kiam ajn la miliardulo devos esti for pro komerco. La miliardulo konsentis, do de tempo al tempo mia amiko iris al la domo por nutri la grandan katon, provizi akvon, ktp. La jaguaro loĝis en kaĝo malantaŭ la domo, ĉe unu ekstremo de korto proksimume 100 metrojn longa. Kompreneble mia amiko neniam eniris la kaĝon de la jaguaro; li nur nutris ĝin per speciala aparato. Ĉiufoje li kunportis sian hundon – etan biglon nomitan Sally.

Staris lampoj sur fostoj laŭlonge de la korto, kaj ankaŭ ĉirkaŭ la granda kaĝo ĉe la fino. Do, piedirante al la kaĝo nokte, oni eniris kaj eliris insulojn de lumo ĉirkaŭitajn de tuta mallumo, ĝis oni alvenis al la kaĝo, kiu estis brile lumigita.

Unu nuban, malluman nokton, mia amiko eniris la korton por zorgi pri la jaguaro. Kiel kutime, li alvenis kun Sally, la biglo. Sally bojegis kaj kuregis laŭ la korto al la kaĝo. Sed la pordo de la kaĝo estis malfermita!

Ĝuste kiam Sally alvenis al la kaĝo, la jaguaro saltis el apuda arbusto, kaj per bato rulis la teruritan hundon tra kelkaj metroj. Sally tuj kuregis reen laŭ la korto al mia amiko. La sperto estis aparte nervoziga, li diris, ĉar Sally ree aperis kaj malaperis dum ŝi kuregis tra la luminsuloj. Kompreneble sekvis la jaguaro; ankaŭ ĝi aperis kaj malaperis ĉasante la hundon. Fine ĝi haltis ie en mallumo... sed kie, mia amiko ne sciis!

“Mi devas moviĝi!”, li pensis, sed pro timo li staris tute senmova. Li sciis, ke se li kuros, la jaguaro eble saltos sur lin. Subite li ekvidis du ardantajn okulojn

nur kelkajn metrojn for. Kaj li sciis, ke jaguaroj povas transiri tian distancon per nur unu salto. Samtempe li aŭdis la jelpojn de Sally de tre malproksime; ŝi jam delonge preterpasis lin kaj kuregis for. Li treege volis sekvi ŝian ekzemplon – sed estis tro malfrue!

Tiuj ardantaj okuloj malrapide alproksimiĝis al li, kaj la jaguaro finfine eniris lumon. Ĝi kaŭris, kun ventro premita kontraŭ la grundo kaj vosto svingetanta de flanko al flanko. La muskoloj de ĝiaj gamboj streĉiĝis, kaj la okuloj rigardis rekte al la okuloj de mia amiko.

Subite, tamen, la jaguaro ruliĝis sur sian dorson ĝuste antaŭ la piedoj de mia amiko. Ĝi komencis ronroni, kaj stariĝis por froti sian kapon kontraŭ liajn kruojn. Efektive, ĝi estis malsovaĝa kiel eta katido! Ĝi ne volis mortigi kaj manĝi la biglon, sed nur ludi. Kaj sciante, ke mia amiko nutros ĝin, ĝi do alproksimiĝis al li nur por akiri manĝaĵon.

Mia amiko prenis la kolumon de la jaguaro kaj kondukis ĝin en la kaĝon. Li remetis seruron (kiun li tute forgesis remeti la antaŭan tagon), kaj iris por serĉi la kompatindan biglon. Finfine li trovis ŝin dek kilometrojn for, ĉe sia hejmo. Verŝajne ŝi jelpis kaj kuregis la tutan vojon.

La venontan tagon li telefonis al la miliardulo por informi lin pri tio, kio okazis. Cetere, li diris, la miliardulo ŝuldas al li freŝan kalsonon.



Johano BENTLEY

Johano loĝas en Mobile, Alabama. Kiel profesia bestkuracisto, li trovas sin sur la limo inter sovaĝejo kaj civilizacio, inter bestoj kaj ties posedantoj – kiuj foje estas pli sovaĝaj ol la bestoj, aparte kiam

mono postuliĝas.

<classicalswordsman@comcast.net>

senintenca esperantaĵo?

Sonos



Jen luksa sendrata laŭtparolilo kiu promesas, ke io aŭdiĝos el ĝi. Ne nun, eble, sed almenaŭ iam en la estonteco. Ĉu ne garantio tro modesta por aparato tiel multekosta?

kolofono

Usona Esperantisto

Sendu kontribuaĵojn al <bulteno@esperanto-usa.org>, aŭ al:

Usona Esperantisto, c/o Hoss Firooznia
CPU 271205, U. of Rochester
Rochester, NY 14627-1205, USA

Usona Esperantisto estas la dumonata bulteno de Esperanto-USA [<http://esperanto-usa.org>]. Ni bonvenigas kontribuojn kaj en Esperanto kaj en la angla. Prefere uzu retpoŝton, kaj aldonu viajn nomon, adreson kaj foton de via vizaĝo. Al aliaj fotoj bonvolu aldoni notojn pri datoj, lokoj, kaj nomoj de foti(n)toj. Ni perpoŝte resendos materialojn se vi sendas mem-adresitan, afrankitan koverton.

Oni rajtas reaperigi materialojn du monatojn post la eldondato, kun fontindiko. Bonvolu sendi ekzemplerojn de republikigita materialo al supra adreso. Opinioj esprimitaj ĉi tie apartenas al la individuaj aŭtoroj, kaj ne nepre spegulas vidpunktojn de la redaktisto aŭ de Esperanto-USA.